- Otelo, la Maŭro de Venecio** (Othello, the Moor of Venice) — trad. Reto Rossétti; antaŭparolo de Roy Walker. Stafeto 1960. 208p.
- Reĝo Lear (King Lear)** — trad. Arthur Curry kaj Archibald Ashley; antaŭparolo de tradukintoj. W. Limpert, Dresden 1924. 170 p.
- Romeo kaj Julieto** (Romeo and Juliet) — trad. Stephen A. Andrew (proze); antaŭparolo de tradukinto E-o Publishing Co., Rickmansworth 1945. 77 p.
- Sonĝo de someromeza nokto** (A midsummer night's dream) — trad. Louise Briggs; antaŭparolo kaj notoj de tradukinto. Brit. Lit. k Debata Soc., London 1921. 70p.
- Trojlo kaj Kresida** (Troilus and Cressida) — trad. Stephen A. Andrew (proze); antaŭparolo de tradukinto. E-o Publishing Co., Rickmansworth 1952. 94 p.
- La Venecia komercisto** (The merchant of Venice) — trad. Alfred E. Wackrill; antaŭparolo de tradukinto. Brit. E-o Association, London 1914. 101p.
- La ventego** (The tempest) — trad. Achille Motteau; antaŭparolo de tradukinto. The E-ist, London 1904. 96p.
- El tragedioj de Shakespeare** — kompilis Mijake Ŝihej. Japana Eo-Instituto, Tokio 1935. 100 p.

2. Verkoj nun preparataj

- Hamleto, reĝido de Danujo** (Hamlet, Prince of Denmark) — trad. L. L. Zamenhof. 8-a eld. notoj kaj antaŭparolo de D. B. Gregor. Editions Françaises d'Esperanto, Marmande 1964. 206p. 20 × 13 (plus antaŭparolo) (dek plenpaĝaj ilustraĵoj de McIntosh; 4-kolora kovrilo de Anny Goudin) jus aperis.
- Hamleto, Princo de Danlando** (Hamlet, Prince of Denmark) — trad. L. N. M. Newell. Stafeto.
- Komedio de eraroj** (Comedy of errors) — trad. William Auld kaj Asen Simeonov. Stafeto.
- Mildigo de la megero** (Taming of the Shrew) — trad. Gerald Jervis. Stafeto.

HAMLETO, Reĝido de Danujo. Tragedio en kvin aktoj. Tradukis L. Zamenhof. Ilustraĵoj de McIntosh. Oka eldono. Editions Françaises d'Espéranto, Marmande, 1964. VIII 206 p., 13,5 20. Bindita.

Esperanto estis apenaŭ 7-jara, kiam en 1894 Zamenhof publikigis sian tradukon de Hamleto, la fama dramo en kiu Shakespeare enscenigis la venĝon de la Reĝido de Danujo kontraŭ la murdinto de lia patro.

Oni povus konsideri tro ambicia, tro aŭdaca la provon sufiĉe fidele transponi la riĉan, nuancan lingvon de la angla majstroverko en Esperanton ankoraŭ ne trapasintan sian infanaĝon kaj preskaŭ sentradician. Des pli ĉar Zamenhof volis muldi sian tekston en versformon plej eble similan al la originalo. Sed la flua, vigla kaj klara esperantigo pruvis lian majstrecon kiel ankaŭ la mirigan flekseblecon de lia lingvo. La traduko, konstatas la Enciklopedio, « renkontis senkomparan sukceson kaj pli efikis por la propagando de la lingvo, ol ĉiuj plej lertaj admonoj ».

Certe, oni povas montri al makuletoj. Sed ĉu mirige, se al difinita nombro da kernecaj, densaj versoj de la originalo respondas teksto iom pli longa, aŭ se, por konservi la koncizecon, la traduko tie kaj tie forjonglas vorton kies ellaso oni povus bedaŭri: (Ni pensas i.a. pri la anonco de Horacio, citanta la krimojn kiuj konsistigas la dramon: « so shall you hear of carnal, bloody and unnatural acts ». Kio reduktigas ĉe Zamenhof al: « Vi aŭdos faktojn sangajn, nenaturajn », p. 205/449. Elfalas « carnal », kiujn faktojn Hamleto tamen

konsideras aparta abomenaĵo, foje kaj refoje riproĉante ilian adulton al siaj onklo kaj patrino.)

— aŭ se pro la ritmo ĝi ŝanĝas trafan esprimon al alia malpli taŭga ; (Kiel pale ja sonas p. 37/90 « **Malbona** io estas en Danujo » kompare kun la krude frapa « **Something is rotten** in the state of Denmark ».)

— aŭ se por atingi la celitan versolongon, ĝi aldonas kion la senco ne bezonas ; — aŭ se vortludoj, por kiuj Shakespeare tiel ardas, lamas aŭ eĉ perdiĝas en la traduko : tiun tributon ĝi ja ne povas ne pagi.

Malpli facile klarigeblaj estas kelkaj aliigoj, ekz. p. 76/465 « Per niaj virinoj kaj fraŭlinoj » por « *By'r lady* » (Per Nia Sinjorino), unu el la oftaj popularaj certigaj formuloj, pli fortaj ol nuraj ŝtopvortoj, kaj p. 129/237 « lacertoj » por « *adders fang'd* » (vipuroj venendentaj). Ĉu kulpas misinterpreto, aŭ la fantazio de la tradukinto, aŭ iu alia kialo ? Ne tro gravas, ĉar malgraŭ ĉi tio Hamleto pruviĝis elstara atingajo.

Ĝi plurfoje estis reeldonita en Parizo, ĉe « *Librairie Hachette et Cie* » kaj, post la unua mondmilito, ĉe « *Esperantista Centra Librejo* ».

Kiom la Zamenhofs teksto difektigis jam en la dua eldono (kaj restis same malbele makulita en la sekvantaj) pro prezeraroj kaj la tiel nomitaj korektoj de la franca editoro, pri tio informas G. Warringhien en sia eseo « Kritika aparato de la Zamenhofs Hamleto » (*Lingvo kaj Vivo*, 1954, p. 263 k. skv.), kiun li finas per apenaŭ vualita invito : « Korektan kaj ĝuste komentitan eldonon de Hamleto mi ankoraŭ atendas ».

Kaj jen, kvazaŭ por ankaŭ en Esperantujo festi la 400-an datrevenon de la naskiĝo de la granda Viljamo, aperis la oka eldono sub la editorado de D. B. Gregor. Lia antaŭparolo instruas pri lia celo : plejeble respekti la Zamenhofan tradukon, forigante la prezerarojn jam de jaroj inkrustiĝintajn kaj, post averto al la leganto, modifi formojn el lingva vidpunkto kritikindajn, kies varianton Zamenhof mem akceptis.

Ni tuj, kaj ŝate, konfesos, ke li plene sukcesis prezenti seneraran tekston : unika okazaĵo ĉe la esperantlingva eldonado. Unu rimarkigon oni tamen permesu : kial do sur la titolpaĝo ne estas menciita la nomo de la aŭtoro, de Shakespeare, kion la unua eldono (kaj cetere ankaŭ la aliaj) jes faris ? Kaj kial ne gloso ĉe « *Satiro* », p. 17/160 ?

Se la esperantigo ne ĉiuloke estas sendevie fidela, la editoro, sekvante tiurilate la opinion de G. Warringhien (*Eseoj*, 1956, p. 22) emas atribui almenaŭ parton de la neĝustajoj al la nacilingva teksto kiun Zamenhof uzis. Ne, ne la anglan li uzis, sed iun germanan, aŭ polan, aŭ rusan, aŭ eble plurajn samtempe. Sed tiu enigmo provizore restas sensolva.

Tiu oka eldono tamen volas esti pli ol nur ekzakta repliko de la Zamenhofs teksto. Ĝiaj abundaj piednotoj fojon post fojo fidiinde resendas al la originalo, kiam la traduko iom diferencas ĉu pro ellaso, ĉu pro aldone, ĉu pro iala aliigo. Tiel ĝi ebligas pli ĝustan komparon, pli justan taksadon de la respektivaj meritoj de aŭtoro kaj de tradukinto.

Sendube la studento iom bedaŭros, ke la editoro ne pli konsekvence, pli komplete provizis sian Hamleton per tiuspecaj klarigoj. Sed ni ne estu tiel postulemaj, ni jam kontentiĝu per la multaj provexploroj, ĉar la laboro estas kompetente kaj zorge farita, la libro bele presita kaj plaĉe vestita. La Zamenhofs Hamleto tiel perdis sian cindrulinan aspekton : ĝi estu bonvena en Esperantujo.

"Sonorilo", Belga Esperanto-Federacio D^r F. COUWENBERG.

LA ESPERANTO-STUDANTO

Philosophy on a Park Bench

(His Honor, husband Jones, sits on a park bench. Near him sits a bum.)

Jo: Truly, it's becoming a bit chilly to recline on a park bench.

Bu: Well, I intend to head south. You've got a home, haven't you?

Jo: Yes, of course! But last night I came home very late. So, today, the atmosphere is frostier there than here.

Bu: Cold as ice, huh? Have you tried to melt her with a few well-placed compliments?

Jo: That won't help. Women are like stones, when they once decide on something.

Bu: Oh, no, Bud! They'll all give in if you kiss their hand and call them "Miss America." I'm a bum, but I know human nature. Flattery is like the sun of spring melting the snow.

Jo: Well now, you are an eloquent gypsy. Your words are wise!

Bu: Try them out, then. You will thank me!

Jo: So it seems!
(His Honor goes home, where he encounters his wife.)

Jo: Martha, my dear! I was on my way downtown, when I remembered that I did not kiss you goodbye.

Ma: Wh-a-a- What?

Jo: You are so charming standing there in the full bloom of your mellow maturity.

Ma: Wait a minute! You sound like two other fellows.

Jo: Oh, those words thrill me, coming from your sweet lips.

Ma: I'm so very happy, because while you are still enraptured I have a grand idea! You can put on the storm windows against the cold.

Jo: (while he laboriously climbs a ladder) Old fashioned storm windows! And a plague on those park bench philosophers!

Filozofio sur Parkbenko

(Lia Moŝto, edzo Jones, sidas sur parkbenko. Apud li sidas vagabondo.)

Jo: Vere, fariĝas iom tro malvarme ripozi sur parkbenko.

Va: Nu, mi intencas direkti min suden. Vi havas hejmon, ĉu ne?

Jo: Kompreneble! Sed hieraŭ nokte mi alvenis hejme tre malfrue. Do, hodiaŭ la atmosfero estas pli frostata tie ol ĉi tie.

Va: Malvarma kiel glacio, ĉu? Ĉu vi provis degeligi ŝin per kelkaj bone jetitaj komplimentoj?

Jo: Tio ne helpas. Virinoj estas kiel ŝtonoj, kiam ili foje decidis pri io.

Va: Tute ne, Amiko! Ili ĉiuj cedos kiam oni kisas la manon kaj nomas ilin "Fraŭlino Ameriko." Mi estas vagabondo, sed mi scias la homan naturon. Flatado estas kiel printempa suno degeliganta la neĝon.

Jo: Nu, vi ja estas elokventa cigano. Viaj vortoj estas saĝaj!

Va: Provu ilin, do. Vi dankos al mi!

Jo: Verŝajne, ke jes!
(Lia Moŝto iras hejmen, kie li renkontas sian edzinon.)

Jo: Marto, mia kara! Mi estis survoje al la urbo, kiam mi memoris, ke mi ne adiaŭis vin per kiso.

Ma: K-i-i- Kio?

Jo: Vi estas tre ĉarma, staranta tie en la plena florado de via milda matureco.

Ma: Atendu momenton! Vi sonas kiel du aliaj uloj.

Jo: Ha, tiuj vortoj ravas min, venantaj de viaj dolĉaj lipoj.

Ma: Mi estas treege feliĉa, ĉar dum vi ankoraŭ estas ravita, mi havas belegan ideon! Vi povas surmeti la ŝirmfenestrojn kontraŭ la malvarmo.

Jo: (dum li malfacile grimpas sur ŝtupetaron) Malnovmodaj ŝirmfenestroj! Kaj plagon al tiuj parkbenkaj filozofoj!

- D. T. C.

ESPERANTA KRONIKO

S-ro Paul Larose, Ottawa, Ont., Kanado, jam membro dum multaj jaroj, pasigas la vintron en bela Nice, Francujo, de kie li sendis renovigon. Multaj el ni ŝatus esti kun li tie en la sunplena vetero.

S-ino Angela Alfaroli, Vineland, N.J., estas vera "angolino" al ĉiuj kiujn ŝi konas. Ŝi havas plej altan rekordon en la Honor-Listo de EANA. Dum dudek jaroj ŝi estas Membro-Patrono, varbis abonantojn, aĉetis librojn por disdoni, kontribuis al Kongresoj kaj Biblioteko, kaj elstaras kiel amata samideanino en ĉiuj klopodoj por Esperanto.

S-ro Thomas H. Goodman, Baltimore, Md., interesiĝis pri Esperanto dum li estis studento de la franca lingvo ĉe Tufts-Universitato, Mass., en 1959. Spite de kolegiaj studoj, li bonege lernis Esperanton kaj kolektis kaj legis multajn Esperantajn librojn. Post la lernej-jaroj, li servis en la armeo ĉe Fort Knox, Ky. Fininte sian servon, li nun estas hejme kaj estas instruisto de la franca lingvo. Tamen Esperanto estas lia plej ŝatata lingvo kaj li multmaniere servas la movadon.

Atestoj pri Kapableco: Ni fieras pri du membroj en Urbo Kebeko, Kanado, kiuj sukcesis en EANA-ekzamenoj por "Atesto pri Kapableco kun Rajto de Instruado," nome S-ro Vincent Beaupré kaj Frato Henri Bolduc.

S-ro E. E. Ievins, Le Center, Minn., havas 88 jarojn, sed li daŭre interesiĝas pri Esperanto. Ni gratulas lin. Li perfekte skribas Esperante. Ni bedaŭras aŭdi, ke li nun kuŝas en lito pro malsano, kaj ke la edzino ankaŭ estas malsana. Li estas rifuĝinto de Balta lando, kaj estas Esperantisto dum 60 jaroj. Bondezirojn al nia kara veterano.

GySgt. James C. Faughnan, Havajo, speciala suboficiro en la Usona Marsoldataro, sendas al AE multe da artikoletoj, eltranĉaĵoj, humoraĵoj, lingvaj novaĵoj, esperantaĵoj, ktp, kiujn ni esperas presi de tempo al tempo. Pro tio ni nomas lin "ACE Reporter for AE" (Always Considering Esperanto). Li havis sperton en "bataloj" kun la "Agresaj Fortoj" kiuj uzas Esperanton en militludoj. Ni ŝuldas al li la unuajn informojn tiurilate. GySgt. Faughnan jam estas Membro-Patrono de EANA dum dektri jaroj, kaj li fariĝis Membro de la Subtena Konsilantaro je la komenco de 1965. Li estas ĉiam plej fidela kaj helpema al EANA.

F-ino Nelly Pérez Yip, Santurce, Portoriko, studas en la universitato tie por pretigi pri posta studado de diplomatio en Washington, D.C. Estante tre lerta Esperantistino, ŝi gvidas Esperanto-kurson kaj pretigas la gestudentojn por tutmonda korespondado. Ŝi varbis multajn studentojn por EANA. F-ino Pérez Yip naskiĝis en Panamo de patrino el Portoriko kaj patro el Peruo. Verŝajne tia miksaĵo estas bonefika por produkti tiom da kapablo kaj beleco, kiujn ŝi abunde havas.

William P. Vathis, Usona Konsulejo, Nogales, Meksiko: Ni presis en maj-aug AE pri lia familio kaj nova posteno en Meksiko. Sed nun ni tre ĝojas anonci "aldoneton" al la feliĉa familio, nome *Michael Andrew*, kiu naskiĝis la okan de februaro 1965 kun pezeco ses funtojn kaj dek-kvar ŭncojn. Ni gratulas kaj bondeziras al Erika kaj William, kaj ni ĝojas kune kun Peter, kiu nun havas belan etan fraton.

Isabel & Monroe Smith, 2910 Bobolink, Delray Beach, Fla., aktive partoprenas en progresemaĵoj, kaj ili anoncas interesan du-semajnan libertempon en Nord-Karolino. Tio okazos ĉe ilia cent-akrea "Camp Fellowship" ĉe la "Great Smokie Mountain National Park", Bryson City, N.C., de la 20-a de junio ĝis la 3-a de julio inkluzive. Grupo de ge-Esperantistoj ĉeestos. Kosto estas nur \$50 por ĉambro kaj manĝoj dum la tuta periodo de du semajnoj. Petu informojn de ili.

Prof. Uladyslau Rzy-Ryski, Ph.D., altestimata membro nia, pripensas la enkondukon de Esperanto en Belknap College, N.H., "se ne kiel aparta kurso, tiam almenaŭ kiel parto de nia kompara lingvistika programo por niaj diplomitaj studentoj." Ni deziras bonsukceson al li.

Walter A. Donner, 17308 Mapleboro Rd., Maple Heights, Ohio, ankoraŭ deziras helpojn pri sia kompilado de vort-ofteco en Esperanto. Vidu paraĝrafon en "Kroniko," Nov-Dec AE pri tio, kaj se vi povos helpi lin, skribu al li. Alia interesa okupo lia estas la kolektado de kompletaj serioj de Esperantaj gazetoj. Tre valora listo lia pri frutempaj gazetoj estas: *L'America Esperantisto*, *American Esperanto Journal*, *British Esperantist*, *Amerika Esperantisto*, *La Revuo*, *Esperanto Monthly*, *Revuo Esperanto Internacia*, *La Praktiko*, *American Esperanto Magazine*. Li demandas: "Ĉu multaj legantoj de AE posedas Esperantajn gazetojn eldonitajn dum tiu frutempa periodo?" Se legantoj skribos al ni pri tiu demando, kun listoj, ni penos presi pri la respondo.

D-ro Daniel da Cruz, Colorado Springs, Col., estas sciencisto kaj membro nia dum pli ol dek jaroj. Li havas 85 jarojn, sed daŭrigas sian verkadon de artikoloj kaj libroj pri siaj multaj sciencaj spertoj tra la mondo. Interese estas, ke lia "kredo" estas "ne havi kredojn", kaj li klarigas jene: "Mi nur akceptas faktojn, kaj ne povas akcepti ian ajn specon de kredo, natura aŭ supernatura; ĉar por kredi pri io estas egala al akcepto de io kiel reala fakto sen pruvo." Li havas ion tie!

Ni funebros: *D-rino Luella K. Beecher*, 1964 en Lima, Ohio; patrono kaj subtena komitato dum pli ol 15 jaroj; estris Esp-klubon en Lima; fervora Bahaisto; plej aktiva kaj amata en ĉio. — *S-ino Thos. C. (Elisabeth) Knudsen*, 14/IX/64 en New York, pro kancero; fervora membro kune kun la edzo dum multaj jaroj. — *Michael J. Lydon*, okt. 1964 en Dublin, Ireland; aktiva membro dum la pasintaj tri jaroj. — *D-ro F. C. Neumann*, 1964 en Elizabethtown, Pa.; membro dum 15 jaroj depost nia helpo pri starigo de oficiala Esp-kurso, kiun li instruis en la Kolegio; aŭtoro de "Escape From Terror" (Forkuro de Teroro). — *D-ro Chas. Sass*, 1964 en Philadelphia, Pa., membro dum 13 jaroj; profesoro de matematiko en kolegio. — *Fenton Stancliff*, 1963 en Ohio Masonic Home, Springfield, O.; Esperanto-pioniro; multe verkis pri la statistiko rilate al Esperanto. — *S-ino Ch. Sj. Datoe Toemenggoeng*, 23/IX/62 en Djakarta, Indonesia, pro kancero; estrino en la Indonesia Esp-Asocio; aŭtoro de "Ĉirkaŭ la Domoj kaj Kortoj en Indonezio"; specialisto pri batiko; prelegis al nia Asocio en Nov-Jorko dum vizito al Usono. Ni ŝuldas al nia amata membro, S-ino Edith Kane, Nov-Jorko, la informojn rilate al la morto de nia Indonezia samideano, kion S-ino Kane aŭdis en la Indonezia Paviliono ĉe Mond-Fiuro. — Ni kondolencas al la familioj de la mortintoj.

RUMANIA SIMFONIO

W. SOLZBACHER

Ĉu vi konas la anekdoton pri la azeno? Andreo Cseh, la famkonata instruisto kaj propagandisto de Esperanto, ŝatis rakonti ĝin en kunvenoj kaj en intervjuoj kun ĵurnalistoj. Jen ĝi estas: En Bulgarujo grupo da Esperantistoj bulgaraj, rumanaj, jugoslavaj kaj grekaj vojaĝis kune al Esperanto-Kongreso, vikle babilante en la lingvo Zamenhofa. Maljuna kamparano sidis en angulo de la fervoja vagono kaj ŝajnis aŭskulti atente. Fine li demandis en bulgara lingvo, ĉu la sinjoroj ne estus tiel afablaj informi lin, kiun lingvon ili parolas tiel flue kaj vikle. Volonte oni donos al li tiun informon, diris bulgara samideano. La lingvo ja estas Esperanto, internacia helplingvo facila kaj belsona, per kiu anoj de diversaj nacioj povas interkompreniĝi. "Vi ja vidas, sinjoro," diris la bulgara Esperantisto, "ke mi, kvankam ne parolante greke kaj rumane, povas diskuti libere kun miaj grekaj kaj rumanaj amikoj". "Jes, jes", respondis la kamparano, "mi delonge pensis ke tia internacia lingvo estas necesa". "Ĉu vere, ĉu vere?" demandis la Esperantistoj, "rakontu al ni vian argumenton!" La kamparano klarigis ke li estas migranta vendisto, vojaĝanta de unu vilaĝa foiro al alia, en ĉiuj balkanaj landoj, kaj ke eĉ unufoje li iris ĝis Vieno. Li faras siajn vojaĝojn kun fidela azeno,

kiu portas sur sia dorso la vendotajn artiklojn. "Mi havas grandajn malfacilaĵojn pro la multaj lingvoj", li diris, "sed mia azeno komprenas ĉiun azenon en la mondo. Kiam ĝi renkontas alian azenon, ĉu en Hungarujo ĉu en Grekujo, la du bestoj tuj flaresploras unu la alian kaj komencas perfekte interparoladi en la azena lingvo. Mi ofte pensis: Se la azenoj komprenas unu la alian kaj la homoj ne sukcesas fari same, ĉu ili ne vere estas pli grandaj azenoj ol la azenoj?"

En la hejmlando de Pastro Andreo Cseh kaj en la aliaj landoj de Sudorienta Eŭropo la neceseco de internacia helplingvo estis facile komprenata, kaj flue parolantaj Esperantistoj abundis ĉie. Tiu regiono ja estas vera lingva Babelo. Eĉ la urbonomojn oni devas lerni en du aŭ tri lingvoj, se oni ne volas perdiĝi dum vojaĝo. Kiel diveni, ekzemple, ke Gherla kaj Szamosujvar estas la sama urbo kaj ke Sibiu, Hermannstadt kaj Nagyszeben estas ne tri urboj, sed unu sola?

Legante la ĵurnalojn, oni lasttempe ofte vidis la nomojn Lwow (Lviu, Lemberg, Leopold) kaj Czernovitz (Cernauti). Mi bone konas la du urbojn. En 1930 mi eniris Rumanujon per la fervoja linio Lwow-Czernovitz. Iomete antaŭ la pola-rumana landlimo mi komencis ordigi la paperojn,

kiujn mi portis kun mi, leterojn, manuskriptojn, raportojn. “Ĉu vi vere volas preni tion kun vi en Rumanujon?”, demandis mia najbaro. “Vi ŝajnas havi bonajn rilatojn kun la rumana polico”. “Kun la polico?”, mi respondis surprizite. “Mi havas neniajn rilatojn kun ĝi. Mi estas honesta homo. Kial la polico interesiĝus pri mi?” La rumana sinjoro kaptis kiel iu, kiu renkontis nekredible naivan stultulon. Li estis prava: Ĉe la landlimo mia situacio estis malfacila. Oni devos ekzameni miajn paperojn, la oficisto diris, kaj tio daŭros almenaŭ unu semajnon. “Sed mi ne havas tempon! Mia vojaĝplano estas preta de longa tempo!” Subite mi havis ideon: “Bonvolu legi ĉi tiun dokumenton!” Mi montris invitleteron en Esperanto, kun rumana traduko kaj kun dekkvar subskriboj kaj kaŭĉukstampoj, se mia memoro ne eraras. La dokumento estis fabrikita kelkajn monatojn antaŭe, por havigi al mi senpagan rumanan pasportvizon. La klopodo estis sensukcesa. Sed nun la dokumento servis bone. “Ho, tio estas Esperanto”, diris la oficisto, “mi iam komencis lerni, sed mi forgesis... Bone, jen viaj paperoj, sinjoro; vi povas eniri Rumanujon”. “Mi dankas,” mi respondis en Esperanto, aldonante en rumana lingvo: “Multu mesc”.

Czernovitz estas kosmopolita urbo. Iun knabeton sur la strato oni povas demandi en iu el kvar

aŭ kvin lingvoj (rumane, ukraine, ruse, germane, pole); oni ricevos respondon en la sama lingvo. Sed interkompreno en aferoj, pri kiuj oni ne parolas sur la strato, estas malfacila, kaj sub la paca supraĵo brulas danĝeraj pasioj naciaj kaj politikaj. Esperantistoj abundis en Czernovitz. En ĉiuj ĵurnalvendejoj oni vidis ekzemplerojn de nova Esperanto-gazeto, de kiu la dua numero ĵus aperis en Czernovitz (mi forgesis la nomon; aperis nur malmultaj numeroj). La Delegito de Universala Esperanto-Asocio estis afabla kaj sperta maljunulo, Majoro Hasenoehrl. Li estis estinta majoro en la aŭstra-hungara armeo. Ricevante nur malgrandan pension, li laboris en rumana banko kaj vivis kun sia bonkora (kaj Esperantista) edzino en garaĝsimila dometo, kie mi pasigis kelkajn interesajn vesperojn kun grupo da gesamideanoj.

Mi vojaĝis trans la Karpatajn Montojn per nekredible primitiva transportilo kiu nomiĝis “fervojo”. Ŝajnas ke ĝi estis konstruita dum la unua mondmilito kiel dumtempa armea fervojo, sed ĝi ankoraŭ servis. Unu lokomotivo malnova kaj unu vagono, uzata por personoj, bestoj kaj komercaĵoj, moviĝis sufiĉe malrapide por ebligi dumvojaĝan kolektadon de floroj. La vagonaro dereliĝis nur du aŭ trifoje. La lokomotivisto kaj la hejtisto malrapide, sed kontentige aran-

ĝis la aferon, kaj ni ne falis en unu el la tre romantikaj, sed ne tre allogaj abismoj.

En Transilvanio kaj en Bana-to la babela lingva konfuzo estis ne malpli granda ol en Bukovino, kies ĉefurbo estas Czernovitz. En Rumanujo mi vizitis ruman-ojn, hungarojn, seklerojn, germanojn, judojn, armenojn, polojn, ukrainojn, rusojn kaj serbojn. Mi faris publikajn prelegojn en kvar lingvoj kaj en privataj konversa-cioj parolis aŭ parolaciis dekonu lingvojn. Angla ne estis inter ili. Nur unufoje, en Blaj, mi renkon-tis personon (li estis Deputito en la rumana Parlamento), kiu sciis la anglan lingvon.

Estis necese organizi special-ajn kunvenojn por la diversaj naciaj kaj lingvaj grupoj. En Gherla, ekzemple, mi posttagme-ze parolis en franca lingvo por la rumanoj, kaj la sekretario de la episkopo tradukis miajn vor-tojn en rumanan lingvon. Vespere mi paroladis en la armena kunvenodomo en Esperanto por la armenoj kaj hungaroj, kaj la Esperanto-Delegito, Profesoro Bela Babos, hungaro, tradukis hungaren. En Temešvaro (Timo-soara) mi paroladis por la kato-likoj germanlingve, por la pro-tes-tantoj en Esperanto, kun hun-gara traduko farita de la prezid-anto de la Esperantista Kalvin-ista Junulara Asocio.

Esperanto estis utila ĉie. Ofte sur la strato, en la fervojo, en oficejo, mi vidis la verdan stelon.

Sed la plimulto de la Esperan-tistoj ne estis membroj de Espe-ranto-asocioj kaj ne legis Espe-ranto-gazetojn, ĉar ili estis tro malriĉaj. Salajroj de profesoroj, oficistoj, instruistoj estis nekred-ble malaltaj, kaj multaj ne povis permesi al si la lukson abo-ni gazetojn kaj aĉeti librojn.

En Cluj (Kolozsvar) F-ino Eu-genia Morariu, fratino de la famkonata Cseh-instruisto Tibe-riu Morariu, direktis la Rumanan Esperanto-Instituton fonditan de Andreo Cseh. Kelkaj Esperanto-gazetoj aperis en Rumanujo, en București, Timisoara kaj Cernaui. En Alba Julia, la katolika episkopo, Grafo Majlath, kom-prenis kaj iomete parolis Espe-ranton; li subtenis la Esperanto-movadon per mono kaj kuraĝig-aj vortoj kaj parolis al mi kun granda fiereco kaj simpatio pri la laboro de Pastro Andreo Cseh, kies episkopo li estis.

Poste la milito furiozis en Rumanujo, kaj tirana registaro obeanta al Hitler persekutis pro-gresemajn movadojn. Henriko Fischer-Galati, eks-prezidanto de la Rumana Esperanto-Societo estis rifuĝinto en Istambul, Tur-kujo. Profesoro Trancu-Iasi, kiu ankaŭ iam prezidis la Rumanan Esperanto-Societon kaj kiu estis iam Ministro de Komerco en ru-mana registaro, mortis en 1940, kiam ankaŭ Episkopo Majlath mortis. La plej famkonataj Espe-rantistoj el Rumanujo, Cseh, Mo-rariu, Pragano, estas eksterlande.

ESPERANTA KRONIKO

Oni instruas kaj disvastigas Esperanton: En postaj numeroj de AE ni esperas presi pli da detaloj pri jenaj meritplenaj Esperanto-klopodoj – **Caryl Geppert**, Cornell-studento, N.Y., klopodas por organizi Esperanto-grupojn inter 40 honor-studentoj en la 9-a lernejjaro. – **Evelyn Uhrhan Irving**, Macalester College, Minn., enkondukas Esperanton al 25 studentoj en Ĝenerala Lingvokurso. – **Judith A. Lewis**, State College, Pa., kontribuas por akiri multajn Esperanto-slosilojn por disdonado. – **Donald G. Schaefer**, Central School, Spanish Fork, Utah, instruas Esperanton al 45 lernantoj en la 7-a kaj 8-a lernejjaroj. *Sukceson al ili ĉiuj.*

S-ro Richard Ranc, Nov-Jorko, finis sian servon en la armeo, kio komenciĝis en Ft. Dix, N.J., kaj finiĝis en Ft. Polk, La. **Rikardo** estas ĉiam plej helpa kaj samideana en la laboroj por Esperanto en EANA.

Subtena Konsilantaro de EANA: Ni fiere anoncas la aldonon de kvar novaj membroj de la Subtena Konsilantaro, kies nomoj aperas sub la rubriko de AE sur la interna kovrilo-paĝo 2. De tempo al tempo okazas, ke membro de la Subtena Konsilantaro devas ĉesi, kompreneble, kaj alia povas kontribui dum nur unu jaro; do ni konstante bezonas novajn kontribuantojn "por stopi la breĉon." Ni ja dankas al tiuj, kiuj restas en la Konsilantaro, kaj fiere bonvenigas novajn membrojn en ĝi, ĉar vere la laboro pri la Asocio kaj AE dependas multe je tiuj, kiuj tiel oferadas finance kaj tiel kunlaboras kiel kolegoj en la progresigo de Esperanto. Ni do grande dankas al la kvar novaj kolegoj: **D-ro Thomas B. Turner**, Florido, kiu komencis kontribui pasintan julion per granda sumo; kaj la sekvantaj membroj kiuj komencis kontribui je la unua de januaro – **S-ro Edward Lindberg**, "Esperanto-Radio," Nov-Jorko, **Wm. F. Haygood, Jr.**, Usona Militmaristaro; **GySgt. James C. Faughnan**, Usona Marsoldataro.



DEZIRAS KORESPONDI

Portoriko. F-ino Nelly Pérez Yip, Las Flores 367, Int., *Santurce*, Puerto Rico 00912, estras klubon de novaj ge-samideanoj, kies membroj dez. kor. ĉiulande kun ge-samideanoj 18-45 jaraĝaj, pri ĉiuj temoj.

Usono. F-ino Judith A. Lewis, 609 Kennard Road, *State College*, Penna. 16801, U.S.A. Esperanta komencanto dez. kor. kun ĉiuj landoj, pri ĉiuj temoj. Certe respondos al ĉiuj.

Usono. Esperanto, 1837 N.E. 49 Ave., Portland 13, Ore., U.S.A., tre bezonas ekz. de "*Literatura Mondo*", Januaro 1933. Ni volonte pagos tre liberele per valoraj libroj aŭ kelkaj dolaroj. Skribu al ni.

Via Vojaĝo al la Kongreso en Tokio aŭ ie ajn en la Mondo

S-ro Louis Small, *Esperanto Dept., Trans Global Travel, 6333 Wilshire Blvd., Los Angeles, Calif. 90048, U. S. A.*, peranto por unu el la plej grandaj vojaĝagentejoj en Kalifornio, perados vian vojaĝon al la Esperanto-Kongreso en Japanujo (31-an julio – 7-an aŭgusto), aŭ ie ajn kaj iam ajn en Usono aŭ eksterlande. Petu detalojn de S-ro Small.

Sperta Traduka Servo – Esperanta-Angla aŭ Angla-Esperanta

ESPERANTO, P.O. Box 213, *Monroeville, Pennsylvania, USA*. Ni tradukas resumojn, leterojn, artikolojn, librojn, de Esperanta en Anglan aŭ Angla en Esperantan. Teknika, komerca aŭ literatura temoj. Po \$3 por ĉiu 100 vortoj, po \$20 por ĉiu 1000 vortoj. Sperta kaj senerara servo.

POPULAR ESPERANTO BOOKS

The Esperanto Book Service, official book service of EANA, is fully equipped to supply ALL your book needs. Here are a few titles. Write to the address below for complete book lists. Place all your orders with the "Esperanto Book Service."

ESPERANTO FOR BEGINNERS, <i>Butler</i> , easiest concise text, 28 p.....	\$.15
THE ESPERANTO TEACHER, <i>Stuttard</i> , an excel low-cost textbook, 106 p.....	.50
POPULARA LERNOLIBRO, <i>Kokeny</i> , LEARNER'S AID, <i>Dodge</i> , excel set 2 bks: Best easy graded Reader, and English Key & Guide to Grammar, 106 p. SET	.70
ESSENTIAL ESPERANTO, <i>Gething</i> , good new standard textbook, 128 p..Cloth	2.50
STEP BY STEP IN ESPERANTO, <i>Butler</i> , easy "non-gram. method", 280 p. Cloth	1.85
ESPERANTO: THE WORLD INTERLANGUAGE, <i>Connor-Solzbacher-Kao</i> , best, "6-bks-in-1", history, textbook, reader, directory, 2 dict. 245 p.....Cloth	3.50
NIXON ESPERANTO VOCABULARY, Eng-Esp & Esp-Eng, beginner dict. 178 p.	.75
EDINBURGH DICTIONARY, Esp-Eng & Eng-Esp, best handy dict. 300 p..Cloth	1.50
MILLIDGE DICTIONARY, Esperanto-English, best BIG Esp-Eng, 509 p...Cloth	2.50
FULCHER & LONG DICT, English-Esperanto, best BIG Eng-Esp, 352 p..Cloth	3.35
PLENA VORTARO DE ESP, all-Esp, with 'Suplemento', complete, 584 p..Cloth	4.35
TALKING YOUR WAY AROUND THE WORLD, <i>Prof. Pei</i> , account in Eng, 224 p.	.50
ONE LANGUAGE FOR THE WORLD, <i>Prof. Pei</i> , "how to achieve it", 307 p.Cloth	5.00
WORLD'S CHIEF LANGUAGES, <i>Prof. Pei</i> , all langs, incl. Esp. 663 p.....Cloth	6.75
SAY IT IN ESPERANTO, <i>Connor</i> , Eng & Esp, 1000 modern Esp phrases, 160 p.	.75
NAŬLINGVA ETIMOLOGIA LEKSIKONO, <i>Bastien</i> , Esp & 8 langs, 334 p..Cloth	2.35
FUNDAMENTA KRESTOMATIO, <i>Zamenhof</i> , basic Esp vol, 442 p....Deluxe BD	3.50
LINGVO KAJ VIVO, <i>Waringhien</i> , "Esperantologiaj Eseoj", must, 452 p....Cloth	4.80
PLANLINGVAJ PROBLEMOJ, <i>Gilbert</i> , compares Esp. with "projects", 100 p..	1.25
ORA LIBRO DE ESP. MOVADO, richly illust. bk of 1st 50 yrs of Esp, 240 p....	1.75
ESPERANTISMO, <i>Braga</i> , Esp miscellany, topics in best Esp style, 32 p.....	.25
VIVO DE ZAMENHOF, <i>Privat</i> , remarkable story of his life, illust, 133 p...Cloth	1.15
LA SANKTA BIBLIO, "The best reader", bound in art vellum, 996 p.....Cloth	2.50
ESPERO INTERNACIA, 240 religious songs, full music notes, 230 p..Card BD	.75
KARLO, <i>Privat</i> , very popular easy first reader, life of young man, 47 p.....	.30
ESPERANTO-SORTIMENTO, good reading at low cost, 5 books, reg. 30¢ each:	
Akrobato, <i>Blanche</i> , Argenta Akvo, Miserere, Thais, Rozujo, over 200 p.....	1.00
TRI HOMOJ EN BOATO, <i>Jerome</i> , popular, easy, amusing, big novel, 258 p.....	1.50
PROVERBARO ESPERANTA, <i>Zamenhof</i> , with a full analytical index, 167 p....	1.70
MARIA KAJ LA GRUPO, <i>Emba</i> , excel orig novel re Marie & Esp Club, 172 p...	.85
MUZIK-NOTOJ, <i>Baghy & Kalocsay</i> , 10 songs, words & music complete, 34 p...	.35
ROMAJ ELEGIOJ & LA TAGLIBRO, <i>Goethe</i> (Kalocsay), amatory poems, 80 p..	.65
SVISA ANTOLOGIO, <i>ed. Bauer</i> , from 4 langs, top best anthology, BIG 540 p....	3.95
AMO EN LA JARO DEKMIL, <i>Elola</i> , novel, love's hidden power, 351 p....Bound	1.25
ANSTATAŬA EDZINO, <i>Maxwell</i> , novel, love intrigue & escape, 212 p....Bound	1.15
ALASKA STAFETO (& Kapitaj de la Glaciokoj), <i>Omelka</i> , excel, 96 p....Cloth	1.15
GÖSTA BERLINGO, <i>Lagerlöf</i> , exciting famed Swedish classic, 552 p.....Cloth	3.50
LA MARVIRINETO, <i>Andersen's</i> fairy tale, deluxe illust LARGE, 78 big p.Cloth	2.40
LA VERDA RAKETO, <i>Forge</i> , 9 orig novels, some re Esperanto, 150 p.....Cloth	2.40
PORINFANA SERIO, 10 most beautiful illust. children's books, each 16 p.....	2.50
SET OF 20 RARE KEYS, unique large rare set of 20 different languages.....	3.00
YEARLY COLLECTIONS "AMERIKA ESPERANTISTO", complete, beginning 1944 to and including 1961 (except '48 and '59). Choose any 1 year, \$1.50; 3 or more years, ea. \$1.00; ALL 16 years complete since publication began, ea. 75¢ (only \$12 for ALL). Magazines shipped fr. EANA office, Portland....	12.00
ENAMEL GREEN STAR, Esperanto insignia - button, brooch or tie pin, each..	.50
INDIAN BEAD STAR, truly a real 'jewel', orig \$1, 1 1/4" dia, safety catch....	.85
ESPERANTO PENNANT, quality felt with Star & "Esperanto", 9" long 4" base.	.30

Esperanto Book Service, Williamsburg P.O. Box 315,
Brooklyn, New York 11211

"SAY IT IN ESPERANTO"

by G. Alan and Doris T. Connor

Tells You What to Say and How to Say it!

You'll be delighted by the ease with which you'll immediately be saying whole phrases in Esperanto. Practice ordering meals, renting rooms, driving a car, going to a doctor, going shopping, etc., by using this handy manual.

5¼ x 3½ in. for purse or pocket. Over 1000 phrases, many never before translated into Esperanto. A complete index with unique numbering system so that you find the phrase you want instantly. A quality product with strong covers and sewn back. A guide to conversation, with summary of grammar. Useful in Esperanto courses.

It is a thoughtful, useful gift for friends, too!

Those who receive it will find much interest in learning to say useful phrases in Esperanto; and will want to go on to a mastery of the interlanguage. Order them in quantity!

Price only 75¢ each, discounts to groups & dealers.

Published by Dover Publications, Inc. Order from EANA.



only
75¢

LINGUAPHONE HOME STUDY COURSES

You can learn *ESPERANTO*, or any other language listed below, by the world-renowned *Linguaphone* Ear-Eye Method. Order through the *Esperanto Ass'n of N.A.* for benefits to both yourself and your Esperanto Central Office. You may select:

Esperanto	Russian	Swedish	Persian
Italian	Finnish	Hebrew	Hausa
Irish	Arabic	Bengali	Spanish
Polish	Japanese	Greek	Dutch
Chinese	Latin	German	Afrikaans
Malay	French	Czech	Hindustani
English	Portuguese	Norwegian	Effik

Regular list price for *Esperanto*, complete course, is \$57.50. Most other languages are priced the same. A few higher, a few lower—dependent upon number of records and other factors. Write to *Esperanto Ass'n of N.A.* about any language in which you are interested. Special payments for members of EANA.

Esperanto Ass'n of N.A., 1837 N.E. 49 Ave., Portland 13, Ore.